
# KOSMOS

Revuo de Martinus-Instituto




**Martinus: La principo de vivunuoj**
**Simbolo n-ro 7, © Martinus Institut**

N-ro 2, 2021 Esperanto

# Enhavo

KLARGIGO DE LA SIMBOLO: LA PRINCIPO DE VIVUNUOJ - SIMBOLO N-RO 7................2
KIEL KONTRAŬLABORI SIAN MALLUMAN SORTON? ..........................................................3
DEMANDO DE LEGANTO: KIAL ONI NE MANĜU VIANDON AŬ ANIMALAN MANĜAĴON? ..........................................................................................................................7
LA TERGLOBO ESTAS VIVA ESTULO ...........................................................................8

# Klargigo de la simbolo: La principo de vivunuoj - Simbolo n-ro 7

Ĉi tiu simbolo de Martinus celas montri ke la tuta kosmo estas vivanta organismo, konsistanta el vivantaj estuloj ene de vivantaj estuloj. La vivanta estulo havas tri aspektojn X1, X2 kaj X3. La triangulo simbolas X1, la mion aŭ la "kreanton". La granda blanka kampo en la mezo simbolas X2, la superkonscion aŭ la "kre-kapablon", kaj la kampo ĉirkaŭ ĝi estas X3, la organismo aŭ la "kreaĵo". La ripetado de la simbolo en pli malgrandaj formatoj montras ke la vivantaj estuloj troviĝas unu ene de la alia. Nia korpo konsistas el organoj, kiuj konsistas el ĉeloj, kiuj estas konstruitaj el pli malgrandaj mikroestuloj, kaj tiel plu senfine en la mikrokosmon. Sammaniere la homo mem estas mikroestulo en la organismo de la terglobo, kiu estas ĉelo de la sunsistemo, kiu estas ĉelo de la galaksio kaj tiel plu senfine en la makrokosmon.

# Klarigo de la principo de vivunuoj en La Eterna Mondbildo 1

### Klarigo pri simbolo n-ro 7

La simbolo montras vivan estulon. La triangulo kaj la blanka figuro en la mezo simbolas la mion kaj ĝian superkonscion, dum la ĉirkaŭa figuro simbolas ĝian fizikan organismon aŭ korpon.
En tiu korpo la simbolo estas ripete desegnita en pli kaj pli malgrandaj formatoj unu ene en alia. Tio simbolas, ke same kiel tiuj figuroj estas desegnitaj en aliaj figuroj, tiel same ankaŭ la organismoj de la vivaj estuloj estas enkonstruitaj en organismoj de aliaj vivaj estuloj. Per tio ekzistas la vivkondiĉa makro- kaj mikroestula stato, kaj ĝi garantias vivspacon kaj eblojn de kreado kaj travivado por la samaj vivaj estuloj.

Nia fizika organismo formas universon aŭ vivspacon por niaj organoj, kaj tiuj formas universon aŭ vivspacon por ankoraŭ pli malgrandaj mikroestuloj, kaj tiel daŭrante malsupren en la senfina malgrando. Sammaniere ankaŭ ni estas per nia fizika korpo mikroestulo en organismo pli granda, kaj en ĉi tiu kazo tio signifas: en la organismo de la terglobo, kiu estas organo aŭ mikroorganismo en la strukturo aŭ organismo de la sunsistemo. Kaj tiu estas mikroorganismo en la galaksisistemo, kiu mem estas mikroorganismo en sistemo aŭ organismo ankoraŭ pli granda, kaj tiel daŭrante supren en la senfina grando.

Tiel la universo estas senfina unuo konsistanta el nedisigeble kunligitaj vivaj estuloj ene en vivaj estuloj. Per tio la universo aperas kiel kulmina kaj ĉioampleksa oceano da vivo, konscio, travivado kaj kreado. Tio, ke tiu gigantokonscio estas viva estulo ekzistanta en si mem, montriĝas fakto per tio, ke neniel la konscio, travivado kaj kreado de ia ajn viva estulo povas ekzisti

alimaniere ol en sia absolute nedisigebla ligo kaj kunlaboro kun la menciita gigantokonscio. Sed io, kio estas nedisigeble kunligita, povas ekzisti nur kiel unuo. Sed unuo de kunlaborantaj organoj aŭ korpoj direktata de la dia "Io", kiu aperas kiel la mio en la vivaj estuloj, povas ekzisti nur kiel viva estulo. La organismo de tiu viva estulo sekve konsistas el la organismoj de ĉiuj ekzistantaj vivaj estuloj kune, kio estas la tuta materia universo. Sammaniere ĝiaj mio kaj konscio konsistas el la mioj kaj konscioj de ĉiuj ekzistantaj vivaj estuloj. Tiel ĉiuj ekzistantaj vivaj estuloj konsistigas unu ĉioampleksan vivan estulon, kaj tion montras tio, ke ĉia ajn viva estulo povas ekzisti ĝuste nur per siaj nedisigeblaj ligiteco kaj kunlaboro kun la viva origino de tiu universo. Ĉi tie ni havis unuan videton de la ekzisto de eterna Dio, kun kiu nia mio, nia konscio, nia organismo kaj per tio ankaŭ niaj manifestado, travivado kaj sorto estas nedisigeble kunligitaj.

# Kiel kontraŭlabori sian malluman sorton?

de Martinus

### 1. Ĉiuj homoj klopodas krei por si feliĉan sorton

Ĉiuj vivaj estuloj havas sorton. Tiu sorto povas aperi nur laŭ du formoj: aŭ kiel sento de feliĉo aŭ kiel sento de malfeliĉo. La plimulto de homoj troviĝas en stato, kie ili ne sentas sin tre trankvilaj rilate al sia sorto kaj tial uzas grandegan energion por kontraŭbatali tiun maltrankvilon. Sian agadon aŭ ĉiutagan agmanieron ili manifestas nur por krei por si feliĉan sorton aŭ vivspertadon. Konforme al tiu celo gepatroj igas siajn infanojn edukataj en lernejoj kaj instruejoj, igas ilin ekzerciĝi pri metio aŭ fako. Por atingi tiun celon la plej multaj penas enspezi monon, akiri riĉon. Estas ja ordinara opinio, ke riĉo kan mono gardas kontraŭ malfeliĉo. Aliaj homoj penas gardi sin kontraŭ malluma aŭ malfeliĉa sorto ligante sin al tio, kion ni nomas religio. Ni vidas, kiel tiuj homoj ligas sian vivon al religiaj ceremonioj, sakramentoj ktp. kvazaŭ per tio krei al si baron kontraŭ la sufero, kontraŭ la malluma sorto, kiujn ili timas.

### 2. Nuntempe la homo vivas en la epoko de la juĝotago

Sed kia estas do la sorto de la ordinara tera homo? Ĉu ĝi ne estas plena de malĝojo kaj ĉagreno? Ĉu ne la terhoma socio estas plena de sufero de ĉiu imagebla speco? Ĉu ne ĉie, kien oni povas turni sian okulon, floras malsano, mizero, malamikeco, malamo kaj milito? Ĉu ne estas tiel, ke nuntempe ni spertas la detruon, tiun “tagon de juĝo”, kiun en ĉiuj tempoj oni timis kaj kiu por unuopaj individuoj kiel ankaŭ por tutaj popoloj, esprimas la kulminon de sufero aŭ malluma sorto? Ne estas mirige, ke la plej granda demando por ĉiuj pensantaj homoj fariĝis tio, kiel kontraŭbatali ĉi tiun malfeliĉon kaj kiel per sia vivo kontribui al kreo de paco kaj harmonio en la mondo.

## 3. Sian akiritan potencon super la fizika materio la homo uzas por la egoismo

Rigardante malantaŭen en la historio de la homaro, oni vidas, ke de la fora tempo, kiam la individuoj vivis kiel bestoj en la praarbaro kaj ĝis la nuntempo, kiam ili aperas kiel homoj, kiuj per siaj teknika povo kaj granda scio pri la fizika materio regas la elementojn, ili senĉese uzis brutalan potencon kaj superon. Ili senskrupule kaj egoisme agis al aliaj por per tio mem antaŭeniĝi kaj savi vivon kaj la tiel nomatan feliĉon.

En ĉiuj jarcentoj militpropagando kaj militkrioj senĉese instigis al milito, subpremo kaj kripligo, instigis komplete neniigi tiujn, kiuj kontraŭis onian propran avidon aŭ feliĉon. Tiom la vivo de la tera homo infektiĝis per milito, ke ĝi simple fariĝis religio; kaj tio okazis senkonsidere al tio, ke oni atingis evoluŝtupon, kie oni baptis siajn infanojn en la nomo de la "Patro, filo kaj sankta spirito" por per tio fari ilin disĉiploj de li, kiu diris "eningigu vian glavon, ĉar tiu, kiu glavon prenas, per glavo pereos". Ĉu ne okazis eĉ tio, ke ĝuste la nacioj kaj popoloj dediĉitaj por paco kaj proksimula amo fariĝis la plej grandaj fakuloj pri la arto mortigi? Ĉu ekzistas ŝtatoj en la mondo, kiuj posedas kapablon pli mortigan kaj inklinojn pli detruajn ol ĝuste la kristanaj ŝtatoj?

## 4. La pastraroj de la kristanaj ŝtatoj predikas pri proksimula amo, sed samtempe tiuj ŝtatoj havas devigan militservon

Pro tiu fakto la kristanaj ŝtatoj fariĝis mensa fenomeno kun tute speciala karaktero. Ili havas altevoluintan religisistemon kun altnivelaj lernejoj kaj kun pastraro, kiu de centmiloj da katedroj predikas al milionampleksa aŭskultantaro, ke oni devas ami sian proksimulon kiel sin mem, ke oni devas ami tiun, kiu malamas kaj persekutas onin, ke oni devas alturni la alian vangon batite sur la unua; kaj samtempe tiuj ŝtatoj havas grandegajn militinstruejojn, kie oni instruas la junularon fariĝi fakuloj pri la plej ruze elpensita mortigotekniko. Ĉu iuj havas pli grandajn militistaron, militŝiparon kaj pli multajn militaviadilojn ol la tielnomataj kristanaj ŝtatoj? Kaj ĉu estas kontesteble, ke en tiuj ŝtatoj la junularo, kiu per bapto, konfirmacio kaj komunio prepariĝis por fariĝi disĉiploj de la kristanismo, poste pere de la registaro estas devigata militservi, estas devigata lerni pri agmaniero, kiu en ĉiuj rilatoj estas akra kontraŭo al la kristanismo? Ne, ĉiuj scias tion, kaj la plimulto kredas, ke tiel devas esti!



## 5. La kristomenso devas naskiĝi en la voldikta forto kaj pensokoncentro de ĉiu unuopa homo

Sed mondo bazita sur tia speciala speco de logiko, kiun malkaŝas tiu stato, nepre devas sperti tian sorton, kiun la nuntempa vivo montras al ni. Kaj ĉu ne ĝuste la mondsavanto proklamis tion al siaj disĉiploj, kiam li ploris pro la detruo de Jerusalemo, la detruo, kiu okazis, ĉar tiu urbo ne sciis la tempon ĝuste agi? Kaj ĉu ne estas ĝuste tiu interna scio, kiu igis lin vidi la venontan "tagon de juĝo" de la tera homaro? Por li estis memkomprenebla afero, ke la "ĉiela regno" ne povas fariĝi ekstera regno, antaŭ ol ĝi estas realigita interne en ĉiu unuopa tera homo. La "ĉiela regno" povas fariĝi ekstera regno nur, kiam ĉiu unuopa civitano en ĝi portas proksimulan amon kaj altruismon en sia koro. Tial Jesuo vidis, ke en la ekstera mondo la "ĉiela regno" ne povas fariĝi realo per religio-aŭ sektoformiĝo, bapto aŭ sakramento; sed ĝi devas kreiĝi per "lia reapero en la nuboj kun multa gloro", kio signifas kreiĝi per la naskiĝo de lia mensostato en la voldikto kaj pensokoncentro de ĉiu unuopa homo. Tiu naskiĝo de la kristomenso, en la mensa mondo de ĉiu unuopa estulo, estas la sola ekzistanta "ĉiela regno", la plej alta vivofeliĉo. En tiu naskiĝo la tera homo do havas, en formo de la "reveno de Kristo" en propran menson, la solan absolute efikan rimedon kontraŭ sia malfeliĉo kaj sufero, kontraŭ sia malharmonio kun la vivo.

## 6. Ĉiu tera homo devas en sia propra menso prepari sin por la "reveno de Kristo"

Senkonsidere, ĉu li estas budhisto, mahometano aŭ kristano, ĉiu tera homo sekve devas labori por prepari sin por tiu "reveno de Kristo" en sian propran menson aŭ pensmondon. Per tio li plifortigas kaj fundamentas ne nur sian propran vivofeliĉon aŭ kreas al si luman sorton; sed per tio li ankaŭ faras sin unu el tiaj civitanoj, el kiuj ŝtato devas konsisti, se la "ĉiela regno" fariĝu ekstera realaĵo.

## 7. Kie nescio estas forigata, tie la tielnomata "malbono" ĉesas ekzisti

Sed kiel oni do preparas tiun "revenon de Kristo" en nian propran internon, en nian propran menson kaj pensmondon? Tion oni faras unuavice akirante per sia cerbo konon pri la vivoleĝoj, de kiuj dependas ĉiu sortospertado, tiel ke per sia inteligento kaj logika juĝopovo oni ekkomprenas la kaŭzon de la mensostato kaj agmaniero de sia proksimulo. Ĉiu malfeliĉa sorto radikas en nescio. Kie oni estas nescia, tie oni pensas erare. Kiam oni pensas erare, ankaŭ la voldikto eraras, kaj ĉar erara volgvido neeviteble kaŭzas malfeliĉigajn aŭ suferigajn reagojn, oni neniel sur tiu bazo povas krei tiun kontakton inter si kaj siaj ĉirkaŭuloj, kiu rezultigas harmonion kaj feliĉon. Kie ne estas paco, harmonio aŭ feliĉo inter la ĉirkaŭuloj kaj oni mem, tie ekzistas milito. Milito signifas suferon kaj morton, ĝuste la kontraŭon al tiu "ĉiela regno", kiun oni deziras krei. Kaj tiu kontraŭo estas "infero".

## 8. La homo devas lerni koni la kosmajn leĝojn kaj principojn kaj per tio ankaŭ koni sin mem

Ekzistas nur du manieroj, laŭ kiuj oni povas vivi sian vivon, nome la erara kaj la ĝusta vivmanieroj. La erara kreas spertadon de "infero", kaj la ĝusta kreas spertadon de la "ĉiela regno"; kaj sekve ne estas malfacile konstati, ĉu oni kontaktas kun la ĝusta aŭ kun la erara agmaniero. Ke la ordinara tera homo – pro sia nescio pri la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo – plejparte praktikas la eraran agmanieron, pli-malpli malkaŝiĝas per la malfeliĉa sorto, kiun li spertas.
Por multaj el tiuj homoj sekve povas esti tre grave, ke ili lernas vidi, ke la kaŭzon de tio ili trovas nur ĉe si mem. Sen kono pri la profundaj sortoleĝoj la plej granda parto de la homoj serĉas la kaŭzon de sia malfeliĉa sorto ekster si mem, en aferoj ekster sia influo. Tiuj homoj ĉiam kredas, ke

“aliaj” kaŭzis ilian dolorsperton, ili kredas suferi pro maljusto, kredas ke ili estas persekutataj aŭ alimaniere fariĝis viktimoj de malamo kaj malico de la ĉirkaŭuloj. Tiu sinteno kreas amaron kaj sinkompaton kaj ĉiam faras la koncernulon “martiro”.

Ĝuste tiu sinteno tiras la homojn en “malican cirklon”, ĉar ĝi neeviteble kreas senfinan vicon da novaj konfliktoj. Por la homoj sekve estas treege grava afero akiri kosman edukon, per kiu ili lernas koni sin mem kaj kompreni la dependecon inter pensmaniero kaj vivspertado. Sen kono pri tiu dependeco oni tro facile kaptiĝas de pensmaniero, kiu kondukas al sinkultado kaj trosentemo pri si mem, kaj per tio ankaŭ al anima stato, kiu estas la plej fekunda grundo por inklinoj, kiuj ruinigas vivon kaj feliĉon. Nur tiu, kiu “viglas kaj preĝas”, t.e. tiu, kiu ĉiam regas siajn pensojn, dezirojn kaj avidojn, kaj kiu ĉiam havas intencon sekvi per siaj vivo kaj agmaniero la mondsavanton, povas eviti pensi erare. Nur tiu homo kapablas renkonti ĉiun malluman sortorealiĝon kun tiuj animaj trankvilo kaj supereco, kun tiu profunda humilo, kiu kaŝas sin sub la senmortaj vortoj de la mondsavanto: “Patro, plenumiĝu ne mia, sed Via dia volo”.

Trad. Ib Schleicher

*Originala dana titolo: Hvordan modarbejder man sin mørke skæbne?*
*El prelego la 11.05.1947 en Martinus-Instituto. Traduko Ib Schleicher 1999. Unua publikigo en dana Kosmos n-ro 6, 1985.*
Artikolo M0750



Japanaj gastoj el Oomoto ĉe Martinus en Kopenhago. Maldekstre Ib Schleicher interpretas inter Esperanto kaj dana lingvo

# Demando de leganto: Kial oni ne manĝu viandon aŭ animalan manĝaĵon?

**Respondo de Martinus:**
Ĉar viandon, kaj cetere ĉiun animalaĵon escepte de lakto, butero kaj fromaĝo, oni ne povas uzi kiel manĝaĵon sen praktikado de mortigo aŭ detruo de altevoluinta konscia vivo. La leĝo de la vivo, kaj per tio la kondiĉo por sana organismo kaj feliĉa sorto por la homo, estas plenumita de la kvina ordono: "Ne mortigu" (Eliro 20.13). Tial manĝaĵo, kiu estas bazita sur mortigo de konscia vivo, neiel povas esti homnutraĵo laŭ la menciita leĝo. Ĝi sufiĉas por la rabobesto, ĉar por tia estulo ĝi estas vivbezono. Kiam la homoj tiel multe kiel kutime, per sia viandĝuo metas sin sur la saman nivelon kiel la rabobesto, de la kaŭzo estas, ke oni heredis kaj ankoraŭ ne dekutimigis tian staton de kutimo aŭ kutimaĉo. Ke la homo ne devas vivteni sin per rabobesta nutraĵo, tio evidentiĝas per tio, ke la besta nutraĵo fakte tute ne estas vivnecesa por la homo, same kiel por la rabobesto. Sed tia ĝuego de kadavraĵo kaŭzos iom post iom malbonan sortoformadon kaj detruadon de la sanstato, kaj tio rezultigas, sekve de la evoluo, ke la homo fariĝos pli intelekte kaj etike nobla, kaj tial forprenos la bestajn produktojn de sia nutraĵo.
*Artikolo eo-M3003*
(Vidu ankaŭ la libron: *La ideala nutraĵo*)



# La Terglobo estas viva estulo

**Parto 1 el 3.**

**de Ole Therkelsen**

## 1. La hipotezo de Gaja – la terglobo estas vivanta estulo

Jam en 1932 en la unua volumo de la ĉefverko *Livets Bog* Martinus skribas ke la terglobo estas vivanta estulo evoluanta. Li ne aparte multe traktas la biologian flankon de la afero, sed tiom pli detale la konsci-rilatan flankon de la evoluo.

Poste en 1982 la ekofilozofo Peter Russell (n. 1946) konatiĝis pro sia libro *The awakening earth* (La tero vekiĝanta), kiu temas pri tio ke la homaro konsistigas tutteran cerbon kiu niatempe komencas vekiĝi.

Sed jam la antikvaj grekoj havis ideon ke la terglobo estas vivanta estulo. Gaja estis la nomo de la greka diino de la tero. La dana nomo Moder Jord (Patrino Tero) same esprimas la ideon ke la terglobo estas vivanta estulo. La hipotezo de Gaja do mallonge dirite estas hipotezo ke Patrino Tero aŭ la terglobo estas vivanta estulo.

La hipotezo de Gaja estis unuafoje science formulita en la 1960-aj jaroj de James Lovelock (n. 1919), kiu faradis memstarajn esplorojn bazitajn sur ekologio kaj sur spertoj el lia antaŭa laboro ĉe NASA pri metodoj detekti vivon sur Marso. Lovelock, kiu studis diversajn ekosistemojn, skribis aron da sciencaj artikoloj kiuj nur en 1979 en popularigita formo ricevis pli vastan atenton per la eldono de lia libro *Gaia: a new look at life* (Gaja: nova rigardo al la vivo).

Pli nova libro de Lovelock havas la titolon *The revenge of Gaia* (La venĝo de Gaja, 2006). Laŭ Martinus ne tiom temas pri tio ke la tero venĝas sin kontraŭ la homoj, sed kun la bonaj kaj malbonaj flankoj temas pri la efiko de la naturleĝoj, inkluzive de reguleca sorta rilato inter la homoj kaj la terglobo. (Vidu par. 9.).



## 2. La terglobo – memreguliga vivanta sistemo

Malkiel Martinus, James Lovelock ne laboras pri la konsci-rilata flanko, sed, kontraste, pri la fizika kaj biologia flanko de la vivo de la terglobo. Montriĝas ke la tero havas mirindan kapablon reguligi kaj teni la saman temperaturon ne nur dum jarmilionoj, sed dum jarmiliardoj, same kiel homo dumvive povas teni konstantan temperaturon de 37°, spite al la variado de la ĉirkaŭa temperaturo. Same kiel homo povas tenadi konstantan salecon en la sango kaj la ceteraj korpaj likvaĵoj, ankaŭ la terglobo povas tenadi konstantan salecon de la oceanoj.

La planedo ankaŭ havas kapablon reguligi kaj tenadi konstantan oksigenan koncentritecon en la atmosfero, kion oni interpretas kiel plian signon ke ĝi estas viva.
Tute koncize Martinus priskribas kiel la terglobo per instinktaj aŭ aŭtomatiĝintaj konsciaj procezoj (nomataj C-scio) povis ŝanĝi kaj agordi la koncentritecon de la diversaj gasoj en la atmosfero favore al la vivantaj estuloj en ĝia organismo.

Martinus skribas: "Ĉi tiu ardanta korpo ĉiam pli malvarmiĝas pro la "senta energio" kaj komencas ekhavi detalojn danke al la "instinkta energio". Atmosfero ekestas ĉirkaŭ ĉi tiu planedo. Estiĝas aero kaj akvo. Tiuj fenomenoj ja certe ankoraŭ estas venenaj aŭ maltaŭgaj por pli alta konscia vivo, sed grade la "instinkta energio" aŭ kosma "C-scio" de la vivantaj estuloj sukcesas venki ĉiujn ĝenajn detalojn. La venenaj fenomenoj apartiĝas, kaj ekestas la kristale klara akvo, kiu poste signifos vivospacon por la enpenetro de la plej unuaj formoj de la tagkonscia vivo sur la terglobo. La kosma "C-scio" aŭ la "instinkta funkcio" ankoraŭ pli forte manifestiĝas. La kristaliĝo komenciĝas, la minerala regno ekestas, sekvas la planta regno." (Artikolaro 1, par. 20.2).

Laŭ scienca kalkulo, la sunsistemo kaj sekve la terglobo formiĝis antaŭ 4,6 miliardoj da jaroj, kaj la plej unua unuĉela vivo ekestis surtere antaŭ ĉ. 3,8 miliardoj da jaroj. Oni kalkulis ke depost tiam la planedo tenas konstantajn temperaturon, oceanan salecon kaj oksigenan koncentritecon en la atmosfero.

Vivantaj estuloj havas specialan kapablon, spite al ŝanĝiĝantaj eksteraj kondiĉoj, reguligadi kaj tenadi iujn fiziologiajn parametrojn en konstantaj valoroj. Tiun memreguligan kapablon oni trovas nur ĉe vivantaj estuloj.

Kiam mi studis naturmedian kontroladon kaj ekologion en la Universitato de Kopenhago, tre fascinis min la studado de la diversaj ekosistemoj, la insulo, la maro, la marsko, la kampo, la monto ktp. El intervenoj en ekosistemo montriĝas ke ĝi adekvate reagas, precize kiel vivanta estulo. Oni tial povas kompari sin al la terglobo kaj ĝia biosfero, ĉar ĝi konsistas el diversaj ekosistemoj kaj subsistemoj, same kiel la homa organismo konsistas el organoj, ĉeloj kaj pliaj subsistemoj.

Sen troa detaligado de la fizikaj aspektoj de la difino de vivo, estu menciite nur ke la biologio havas aron da kriterioj pri tio ĉu io estas konsiderebla kiel viva estulo. Krom unu solan, la tero plenumas ĉiujn tiujn kriteriojn tutcerte. La lasta estas la demando kiel la tero reproduktas sin. Por ke io estu konsiderebla kiel vivanta estulo laŭ la materiisma scienco, ĝi nome devas esti kapabla reprodukti sin sekse aŭ sensekse, kiel ni konas tion ĉe bestoj kaj plantoj.

## 3. Makrokosmaj sekseco kaj embriogenezo

La naturscienco ne kalkulas sunsistemojn kaj galaksiojn kiel vivantajn estulojn. Ĉar planedoj, sunsistemoj kaj galaksioj ne estas konsiderataj de la scienco kiel vivantaj estuloj, oni ankaŭ ne povas paroli pri kosma reproduktado aŭ viv-regenerado. Laŭ la sciencaj kriterioj do estas iom malfacile deklari ke la terglobo estas vivanta estulo.

Kvankam en astronomio oni parolas pri la naskiĝo, vivo kaj morto de stelo, la scienco ŝajne havas neniun komprenemon al eventuala seksa reproduktiĝo de makroestuloj.
Male Martinus klarigas ke la terglobo formiĝis samtempe kun la sunsistemo danke al "makrokosma sekseco" kaj "makrokosma embriogenezo". (Vidu LB2 par. 419-421).

Elektro estas la unua kio ekestas kiam planedo aŭ astro kreiĝas en la kosma spaco, same kiel ĝi estas la unua kio ekestas kiam nia korpo kreiĝas. La sekskuniĝo reprezentas eksplodon de elektraj fortoj en la formo de la voluptosento kaj ĉiuj multaj pensoj ligitaj al ĝi. La unua kio okazas ĉe la ekkreo de organismo do estas ia sumigo de mensaj fortoj, kiu povas transmisiiĝi pluen per fizikaj fortoj al la seksorganoj. Je la spirita nivelo okazas ĉe spirita estulo samtempe aktiviĝo de la kapablocentroj aŭ talentosemoj, kiuj enhavas ĉiom el tiu informaĵo kiu necesas por krei ĝian novan korpon.

La unua videblaĵo de la makrokosma krea procezo estas stelnebuloj, kiuj laŭ Martinus estas ellasita "makrokosma spermo". Sub aŭtomata konscieca direktado formiĝas en ĉi tiu spermo ĉiam pli multaj videblaj punktoj, kiuj iom post iom pasas el la nebuloza stato kaj densiĝas ĝis memstaraj lumantaj sunsistemoj. En la plua evoluo estingiĝas la lumo de parto de la malvarmiĝintaj punktoj, kiuj tiamaniere iĝas planedoj kiel nia terglobo. (LB2 par. 419-428 kaj Artikolaro 1, par. 20.2).

En la hodiaŭa astronomio oni esploras la ekeston de la sunsistemo, kaj la plej novaj rezultoj indikas ke la sunsistemo formiĝis per procezo de plidensiĝo, okazinta tuj post giganta eksplodego kiu rezultigis enormajn elektrajn kaj magnetajn ellasojn, kio en la lumo de la Kosmologio de Martinus estus interpretebla kiel makrokosma seksa ellaso de "makrokosma spermo". – Martinus ja ankaŭ asertas ke la makrokosma embriogenezo komenciĝas per elektro.

## 4. La terglobo kiel vivanta estulo

La fakto ke la fizika korpo de la planedo estas globa, ne povas malkonfirmi ke temas pri vivanta estulo. Kompare al aliaj vivantoj temas nur pri diferenco de formo, ne de principo.

Pri la cirkulado de la akvo en tiu ĉi nia belega planedo oni povas diri ke ĝi analogas al nia sangocirkulado. La mineralaj regionoj de la tero estas la skeleto. Plantoj, bestoj kaj homoj estas kiel ĉeloj en la organismo de la planedo ktp. En la amaskomunikiloj la pluvarbaroj ofte estas priparolataj kiel la pulmoj de la planedo. Pro la fotosintezo de la plantoj produktiĝas $O_2$, kaj karbonhidratoj sinteziĝas el $CO_2$ kaj $H_2O$. Per la metabolo de la vivantaj organismoj tiuj sukeraj substancoj asimiliĝas produktante $CO_2$, $H_2O$ kaj varmon. Tiamaniere eblas ankaŭ rilate al la terglobo paroli pri ĝiaj spirado kaj metabolo. Ĉiuj substancoŝanĝaj procezoj en la naturo estas analogaj al nia propra metabolo.

Por povi esti viva kaj konservi sian vivdisvolvon la terglobo ankaŭ bezonas fizikan nutraĵon, kaj tiun nutraĵon ĝi ricevas de la suno. (Libro n-ro 14B, ĉap. 4).

Kiel ni akiras nian energi-provizon konsumante manĝaĵojn altkvalitajn (malalta entropio, alta ordeco). kaj ellasante rubaĵojn malaltkvalitajn (alta entropio aŭ neordeco)., tiel same la terglobo manĝas "sunaĵon", asimilante lumon aŭ mallongondan radiadon altkvalitan (malalta entropio). kaj ellasante long-ondan varmoradiadon malaltkvalitan (alta entropio). en la spacon kiel ian ekskrementon. Por teni konstantan temperaturon la tero nome devas ellasi tiom da varmo al la kosma spaco kiom ĝi ricevas de la suno.

En la literaturo de Martinus oni plurloke povas legi priskribojn de la terglobo kiel vivanta estulo, ekzemple LB3, par. 555-567, Sepulto, ĉap. 82-87.

## 5. La principo de vivunuoj en la naturo

Vivanta terglobo devas havi sian vivospacon en vivanta sunsistemo por povi konservi sian biosferon, kiu ekzistas interalie danke al la fotosintezo, funkciigata de la lumo de la suno. La sunsistemo siavice havas sian vivospacon en galaksio, kiu havas sian vivospacon en galaksi-amaso ktp. Sed ĉi tie, longe for en la stelnebuloj en la makrokosmo, la homa perceptado komencas iĝi malklara kaj nebula.

Sur vivanta terglobo devas esti vivantaj bestoj kaj plantoj. La organismoj devas esti konstruitaj el vivantaj organoj, kiuj siavice devas esti konstruitaj el vivantaj ĉeloj, kiuj devas esti konstruitaj el vivantaj organikaj molekuloj ktp. Sed ankaŭ ĉi tie, en la profundego ĉe la elektronaj nuboj de la mikrokosmo, denove la homa perceptado komencas iĝi malklara kaj nebula. Sed kadre de nia propra sensa horizonto ni do tre klare vidas la simplan principon ke vivo estas konstruita el vivo, kiu estas konstruita el vivo, kiu estas konstruita el vivo, ktp., kiel Martinus ankaŭ esprimis en sia simbolo de ĉi tiu principo de vivunuoj.

Galaksi-amaso do estas konstruita el galaksioj, kiuj estas konstruitaj el sunsistemoj, kiuj estas konstruitaj el planedoj, kiuj estas konstruitaj el organismoj, kiuj estas konstruitaj el organoj, kiuj

estas konstruitaj el ĉeloj, kiuj estas konstruitaj el molekuloj, atomoj kaj elektronoj. Laŭ la principo de vivunuoj tio pludaŭras eterne, supren en la makrokosmon ĝis la senfine granda skalo, kaj malsupren en la mikrokosmon ĝis la senfine malgranda skalo. Estas samkiel la fraktalaj bildoj, kie oni povas elpreni detaleton kaj pligrandigi ĝin, kaj tiel oni povas daŭrigi sian vojaĝon en la mikrokosmon ĝis eterne. Oni ankaŭ povus prezenti la fraktalan filmon en la inversa direkto, kaj tio do fariĝus eterna vojaĝo en la makrokosmon. Martinus klarigas ke oni per kosma konscio aŭ intuicio povas entrepreni tian vojaĝon malsupren tra la vivantaj estuloj de la mikrokosmo de la realo kaj supren tra la makrokosmo ĝis senfina eterno. (LB6 par. 2114-2118).




## 6. La klimaton regas la makroestulo kaj ne la mikroestuloj

Martinus montras ke la klimaton de la mikroestulo regas la makroestulo. La homo regas la klimaton kiu troviĝas en ĝiaj organa, ĉela kaj molekula mondoj, same kiel la galaksioj kaj la sunsistemo regas kaj reguligas la klimaton de la planedoj. Lige al la $CO_2$-debato oni do ne pretervidu la potencajn eblojn kiujn la terglobo mem havas por redukti la $CO_2$-enhavon de la atmosfero, ekzemple per pliigo de la fotosintezo aŭ sedimentado de kalko $CaCO_3$ en la oceanoj. Ekosistemo ricevanta pliiĝon en la provizo de $CO_2$ nature reagos malpliigante la enhavon. Laŭ Martinus ne la mikroindividuoj, do la homoj, respondecas pri la klimato de la tero, sed male la makroestuloj, la tero, la suno kaj la Lakta Vojo.

De naturscienca flanko oni povas parte konfirmi tion per novaj esploroj de la Spac-esplora Centro de Danio, kiuj montras antaŭe nekonatan interdependecon de la kvanto de vivo surtera kaj la kvanto de kosma radiado. La klimato kaj la kvanto de surtera vivo laŭ ĉi tiuj esploroj ne dependas de la aktivadoj de la homo, sed de la kosma radiado kaj de la suno kaj de la tuta Lakta Vojo. Krome la ŝanĝiĝantaj rilatoj de la Lakta Vojo al la du najbaraj galaksioj, la granda kaj malgranda Magelanaj Nuboj, ankaŭ kreas ŝanĝojn en la kosma radiado kun decida signifo al la kvanto de vivo sur la tero. (Henrik Svensmark, Astronomische Nachrichten, vol. 327, n-ro 9. pp. 866-875, nov. 2006).

Jam en 1939 Martinus skribas ankaŭ ke “la magnetaj ŝtormoj de la suno regas la klimaton kaj vivon de la planedoj”. (LB2 par. 353).

Magnetaj ŝtormoj sur la suno ankaŭ influas la spiritan strukturon de la tero, kiu ĝuste havas elektran kaj magnetan naturon. Ĉio kio okazas sur la sunoj, influas la vivon sur la planedoj. Precipe homoj kun malforta koro povas senti malkomforton dum tiaj magnetaj ŝtormoj de la suno, kaj iuj eĉ povas morti tiaokaze. En demanda horo Martinus diras ke magnetaj ŝtormoj de la suno povas konfuzi la tutan nervan sistemon al homoj kun malbonaj aŭ malfortiĝintaj nervoj, tiel ke ili eksuferas kapturniĝon, kapdoloron aŭ migrenon. Normale ni ne sentus tion en niaj nervoj, sed iuj

estas tiel malfortiĝintaj ke ili ne evitas reagi al tio. Sed kun sana kaj forta organismo oni estus bone gardata. (Varnhem, Svedio, 03.06.1968).

En diversaj prelegoj Martinus precipe mencias ke inundoj, vulkanaj erupcioj kaj tertremoj, kiuj al homoj estas grandaj katastrofoj, al la terglobo estas nur nervaj reagoj. Kaj tute ĝenerale estas tiel ke la konscia vivo de la terglobo estas decida pri la tuta klimato ene de ĝia organismo. Periodo kun multaj klimataj rekordoj tial ankaŭ estos ligita al speciala aktiveco en la konscio de la terglobo. Ĉi-tempe la terglobo trairas evolu-fazon tute decidan, kaj tial estas ne tiel strange ke tiu iom drama elpuriga procezo je la fizika nivelo kelkfoje povas manifestiĝi en la multaj ekstremaj klimataj situacioj, kiujn ni travivas dum ĉi tiuj jaroj.

Se oni mem batalas kaj koleriĝas kaj agaciĝas, aŭ eble tristiĝas kaj deprimiĝas, tio ankaŭ havos tute decidan efikon al la klimato en nia propra organismo.

Ni estas kvazaŭ dio al nia propra universo, same kiel la terglobo ankaŭ estas kiel dio aŭ providenco al ĉiuj vivantaj estuloj kiuj troviĝas en ĝia biosfero. Tiamaniere eblas diri ke kaj la terglobo kaj la homo estas kreitaj laŭ la bildo de Dio, kion Martinus ankaŭ analizis lige al la granda finrezulto n-ro 9 en la solvo de la vivmistero. (LB3 par. 699-700, LEM3 par. 32.11).

## 7. Formortantaj bestospecioj de la terglobo

Oni legas pri tio ke pluraj bestospecioj estas ekstermataj, kaj ke aliajn minacas ekstermiĝo, ekzemple leonoj kaj tigroj. Sed laŭ kosma vidpunkto specio ne povas ekstermiĝi, sed dum sia restado en la spirita mondo dum la morto ĝi povas esti translokita, tiel ke ĝi venontfoje enkarniĝas sur alia planedo, kie la kondiĉoj estas pli favoraj al plua evoluo. (Vidu LEM3 par. 27.1, LB1 par. 247, La ideala nutraĵo, ĉap. 7).

Tiu formortado de iuj bestospecioj kiun ni hodiaŭ vidas, estu rigardata rilate kun tio ke la terglobo estas vivanta estulo evoluanta al perfekteco. Iutempe dominis rampuloj, tiaj kiel lacertoj kaj dinosaŭroj, sed poste ili preskaŭ ekstermiĝis favore al la evoluo de birdoj kaj pli altaj mamuloj, kio ankaŭ estas rigardebla kiel ero de la konsci-evoluo de la planedo. Kun la evoluo de simioj kaj poste homoj la terglobo faris plian grandan paŝon antaŭen en la evoluo de pli alta konscio.

Ĉar la homoj estas la plej alte evoluintaj ĉeloj de la planedo, la evoluo al perfekteco rezultigos ke formortos la bestoj danĝeraj kaj venenaj al homoj, ĉar ili iom post iom ne plu harmonias kun la terglobaj konsci-fortoj, kiuj estas la decida faktoro de tio, kiuj vivaj estuloj povas vivi sur la tero. (Vidu LB1 par. 48, LEM3 par. 27.1).
Se do estonte enkarniĝos novaj bestospecioj, tio estos pacaj bestoj kiuj povos vivi kun la pacaj homoj de la estonteco.

Plantoj, bestoj kaj homoj ja estu rigardataj kiel mikroestuloj de la organismo de la terglobo. La planedo laŭtakte kun sia konsci-evoluo povas altiri novajn speciojn kaj samtempe forpeli aliajn malfaciligante al ili la vivon, tiel ke ili formortas.

Ekzemple estas en Norvegio kaj Svedio vigla debato pri tio ĉu la malmultaj restantaj lupoj estu pafmortigitaj, ĉar ili prenas la brutojn de la kamparanoj kaj ĉar multaj timas iri en la arbaron. Laŭ tio povus ŝajni ke la homoj decidas kiuj bestospecioj vivu sur la tergobo, sed plej profunde decidas pri tio la tergloba estulo.

Martinus skribas: “La homa partopreno en la reguligado de la nombro de vivantaj estuloj sur la tero, reale estas nur bagatelo kompare al la vera reguliga faktoro: la spirita atmosfero de la tero, ĉar ĝi estas la rekta ekkaŭza faktoro en la altira kaj forpuŝa kapablo de la tero. Tiu siavice, laŭ kosmaj analizoj, estas la fundamento de la astronomia rilato de la tero kaj do de ĝia klimato. Sekve la spirita atmosfero per tio fariĝas decida pri ĉiuj nutrorilatoj kaj ekzistad-eblecoj kaj per tio ankaŭ pri la nombro de vivantaj estuloj sur la planedo.” (La ideala nutraĵo, ĉap. 7).

**Daŭrigo n-ro 2 el 3 partoj en sekva numero**



**Ole Therkelsen en Islando dum prelegvojaĝo en 2013**

## INFORMO PRI LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.
La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mond- bildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykø- bing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus- Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 3838 0100 Telefontempo: lundo-ĵaŭdo 9-12 DK p.ĝiro 642-9580 www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen. Kompostado: Jonas Dalmose.

La frontpaĝa bildo: © Martinus Institut

Kopirajto: © Martinus Institut Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut ISSN 1600 4116.



**SENPAGA EO-KOSMOS**

Senpage, du fojojn jare (en marto kaj oktobro) Eo-Kosmos publikiĝos en elŝutebla formato ĉe la adreso: www.martinus.dk/eo.
Rete kaj retpoŝte vi ankaŭ senpage povos aboni Eo-Kosmos kiel alkroĉitan pdf-dosieron.
Sendu vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk.

Martinus-Instituto
Mairendalsvej 94-96,
DK-2000 Frederiksberg,
Kopenhago,
Danio